# HISPANIO kontraŭ HISPANIO

Grava historia krizo trafis Hispanion en monato Julio de la jaro 1936. La respubliko estis suferinta, laŭlonge de la 5 jaroj ekde ĝia naskiĝo, militistan puĉon, de politike dekstra orientiĝo, kiu fiaskis, en la jaro 1932, kaj proletaran revolucion, ankaŭ fiaskintan, en la jaro 1934. Sed ĉi foje nova puĉo, eĉ se nur partece sukcesinta, okazigis komenciĝon de civilmilito kiu daŭris ĝis la jaro 1939. Por la lando tio signifis granda katastrofo. La ribelintaj militistoj efektivigis, en la teritorio kontrolita de ili, reakcian, diktatorecan politikon.

Ĉiuj esperantistaj centroj estis perforte fermitaj kun la escepto de FRATECO de Zaragozo pro la influo, inter la ribelinta militistaro, de la Prezidanto de tiu esperantista asocio, la komandanto Ramón de Salas. Tamen, kvankam oficiale ne fermita, ĝia aktivado estis nula. Male, en la landaj zonoj kontrolitaj de la Respublika armeo, la esperantistaro povis libere aktivadi, sed la milito mem estigis malfacilaĵojn por tiu aktivado. Fakte, nur en Valencio kaj Barcelono regule aperis esperantistaj revuoj kaj bultenoj. Laŭ la iompostioma konkerado de la lando fare de la faŝistaj trupoj, la esperantista ĉeesto malaperadis. Multaj hispanaj esperantistoj, inter ili ankaŭ gravaj lideroj de nia E-movado, mortis dum tiuj militaj jaroj, kelkaj el ili kiel rektaj viktimoj el la milito kaj la sekva perforta subpremado kaj persekutado.




Menciindas tio ke la hispana Respubliko ne ĝuis apogon de la eŭropaj demokratioj dum la ribelintaj militistoj ricevis malavaran kaj efikan subtenon de la faŝismaj reĝimoj, tiuj de Germanio kaj Italio. Estas famkonata la esperantista afiŝo plendanta pro tiu situacio.

Sed oni malmulte scias pri la politikaj inklinoj de la hispanaj esperantistoj. Supozeble, kaj simile al tio okazinta en aliaj eŭropaj landoj, la Esperantista movado ĝenerale teniĝis neŭtrale en la politika tereno. Sur la esperantistaj vicoj de nia lando ne multe efikis la divido tiam intensiĝinta en la popolo, inter la diversaj soci-klasaj pozicioj, sed, jes ja, estis ia kontraŭdiro inter la esperantistoj rilate al teniĝo favore al ***centrisma ŝtato*** aŭ la ***regionaj aŭtonomismoj***. Ĉefe inter la katalunaj geesperantistoj estis tendenco ligi la aktivadon por Esperanto kun la defendo de la kataluna lingvo kaj kulturo.

Ne mankis en Hispanio esperantistaj rondoj kun maldekstra ideologio. De antaŭ kelkaj jardekoj estis fonditaj kelkaj el ili, kiel la grupo "Libera homo" de la madridaj socialistoj, kreita en 1911. Estis laboristaj grupoj ankaŭ en Bilbao, Valencio, Barcelono kaj Gijón. Tamen ne estis politika antagonismo inter tiutipaj E-rondoj kaj la vere neŭtralaj, kaj eĉ burĝaj esperantistoj de nia lando.

Specialan atenton kaj mencion meritas la kazo de la militista esperantisto kaj framasonisto Julio Mangada. Kiam komenciĝis la militista ribelo en Julio 1936, li decide rezistis la ribelintojn. Li gvidis popolajn volontulojn, rapide formiĝintajn al trupo, kaj atingis iujn venkojn kontraŭ ribelintaj fortoj forpuŝi la komencan minacon al Madrido; la loĝantoj aklamis lin kiel popolan heroon. Iam li deklaris ke li estas esperantisto ne pro tio, ke li konsideras Esperanton kiel nuran internacian lingvon, sed ĉar ĝi entenas la ideon de vera frateco kaj per tutmonda uzado servas kiel plej efika elemento kontraŭ la malbenata milito kaj la interhoma malamo. Liaj trupoj proklamis lin “generalo de la popolo”, kvankam la registaro rekonis al li nur la rangon je kolonelo. Oni aljuĝis al li la Oran Medalon de la Madrida Urbo, Oni asignas lian nomon al iu urba strato… Tiuj eventoj estis rapide diskonigitaj en fremdaj landoj, kaj inter la esperantistoj de la tuta mondo li fariĝis simbolo de la rezistado kontraŭ la faŝismo.